

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Abono: 1/4 jare 1.50 zł., 1/2 j. 3 zł. jare 6 zł., Eksterlande egalvaloro
La Redakcio ne resendas manuskriptojn — konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISŁAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Bajwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Loth.

SUBTENANTOJ:

Ing. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Eugenie F. Cense, Dr. Ignacy Dziedzic.

ENHAVO:

MIECZYSLAW TROCHIMOWSKI: Esperanto dla Polski. — **STANISŁAW BRAUN:** El letero al Eska. — Opinje o Esperancie. — **ROLLE DE L'ISLE:** Metodo de propagando en la scienco kaj teknika gazetaro. — **ORGANIZA KOM. DE VII KONGRESO DE P. E. A:** Komuniko № 1. — **S. F. P. E. kaj P. E. A.:** Pri la regularo de la K. R. — Projekto de Regularo. — **LEO TURNO:** La rolo de U. E. A. — Tra la mondo esperantista. — **BEHRENDT:** Agu, Esperantistoj! — **E. F. C.:** Bibliografio. — Ze swiata esperanckiego.

JARO XX.

Warszawa, Februaro

Nr. 2 (120).

Kunveno de Pola Esperanto-Asocio

Warszawa, Królewska 19.

Ĉiamekrede je 8 ĝis 10 h. vespere. La kancelario kaj biblioteko funkcias ĉiamekrede kaj sabate de 7.30 ĝis 9 h. vespere.

Niaj kunlaborantoj:

Leo Belmont (Warszawa), Stanisław Braun (Łódź), Janina Barkathówna (Warszawa), Eugenie Cense (Warszawa), D-ro Antoni Czabryński (Warszawa), D-ro Ignacy Dziedziec (Toruń), Jan Ferencowicz (Warszawa), Helena Hempel (Lwów), Bronisław Kahl (Kraków), Jan Kostecki (Paris), Mieczysław Kaas (Warszawa), Antoni Lange (Warszawa), D-ro Jan Mędrkiewicz (Lublin), Józef Orzech (Tarnów), Włodzimierz Pfeifer (Łódź), Antoni S. Stankiewicz (Warszawa), Leo Turno (Kraków), Mieczysław Grygosiński (Warszawa).

Niaj subtenantoj:

Nia gazeto, privata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas la bonvolan materialan helpon de tiuj polaj esperantistoj por kiaj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anonciĝos des pli enhavoriĉa, laksa kaj pli efika estos la „Pola Esperantisto“.

unika esperanta revuo por poloj.

La nomojn de la subtenantoj ni ĉiam presas sur la unua paĝo de la kovrilo.

Fariĝi Protektoro, Subtenanto aŭ Helpanto de „Pola Esperantisto“ povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 80, 15 aŭ 5.

Subtenantoj ricevos sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de la

„Pola Esperantisto“

Widok 19, Warszawa.

Abonu kaj abonigu por Via gazeto!

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX.

Warszawa, Februaro

Nr. 2 (120).

Esperanto dla Polski.

Sądzimy, że służąc naszej ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie.

Deklaracja poznańska.

Przeszły długie lata niewoli polskiej, przebrzmiały echa walk o niepodległość kraju, a świat wraz z wykreśleniem Polski z karty Europy, wykraślił ją ze swej pamięci. Zapomniano o tem, że Polska, że nauka nasza dały coś dla ogólnego rozwoju. Poczęto patrzeć na kraj nasz, jak na coś, co zniknęło bezpowrotnie, niczem starożytny Rzym lub Kartagina.

Przyszedł rok 1887. Zabłysł nowy język; Esperanto, na polskiej zrodzony ziemi. W jakiś czas później szeregi adeptów owego języka powiększały się. Najbliżej Mistrza stało kilku Polaków—ci stali się fundamentem, na którym budowano nowy ruch. Nazwiska ich, podawane z ust do ust, nasuwały refleksję: „Polacy? Więc Polska żyje, choć wykreślono ją z pośród narodów istniejących“.

Zdawali sobie sprawę pierwsi bojownicy o sprawę esperancką, że na wzorach, które dadzą, uczyć się będzie świat cały. I cóż dać mogli? Dali pierwsze tłumaczenia literatury swej, polskiej. Ukazują się pierwsze przekłady, nowel Sienkiewicza, Prusa i innych. Zamenhof tłumaczył „Martę“ Orzeszkowej.

Z różnych krańców świata nadchodzą listy, witające entuzjastycznie nowy język, nadchodzą do duchowego ośrodka ruchu, do Polski, do Warszawy. Wielu uczy się Esperanta, czyta nowe dzieła, poznaje Polskę, jej literaturę. Co więcej, jakiś japończyk tłumaczy „Martę“ na swój język ojczysty, japoński.

A Polska, kolebka Esperanta, od pierwszej chwili istnienia tego języka otaczana jest szacunkiem, czcią, jako duchowa matka wielkiego dzieła.

I posypały się dalsze przekłady: *Latarnik*, *Faraon*, *Ave*

Patria, Ojciec zadżumionych, Hymn o zachodzie słońca, Wielka improwizacja i wiele, wiele innych. Bein wydaje *Polską Antologję*, nieco później Grabowski tłumaczy *Pana Tadeusza*. Dzięki mistrzowskiemu tłumaczeniu największe arcydzieło literatury naszej staje się własnością całej ludzkości.

Nazwisko Grabowskiego, mistrza poezji esperanckiej, nazwisko Beina, najlepszego stylisty w Esperancji stają się głośne wśród wielkiego już zastępu adeptów nowej myśli.

W roku 1912 Kraków gości w swych murach międzynarodowy Kongres esperantystów. W pamięci esperantystów wszystkich krajów Kongres ten pozostawił jak najlepsze ślady. Szeroko rozniesiono wieść o Polsce, o polskiej gościnności, o najlepszych uczuciach dla bratnich narodów.

Co można było zrobić więcej pod jarzmem nieprzyjacielskiem?

Wojna skończyła się. Szereg esperantystów polskich, rozrzuconych po wszystkich krajach, wraca na łono ojczyzny. Odżywa ostoja polskiego ruchu esperanckiego — Polskie Towarzystwo Esperantystów. Jego członkowie zdają sobie sprawę, jakie obowiązki czekają ich wobec swego kraju.

Na czwartej Konferencji, towarzystwa w Poznaniu, przy uczestnictwie delegatów prowincjonalnych, powzięto jednomyślnie następującą decyzję: *Sądzimy, że służąc naszej ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie.*

I w myśl powziętej decyzji rozpoczęto prace dla Polski, w rozmiarach na jakie stać było. Szereg artykułów, niesie światu wieść o polskim życiu umysłowym, literackim, o stosunkach w Polsce odrodzonej, szereg tłumaczeń zapoznaje świat z Krasieńskim, Krasickim, Dygasińskim i innymi.

I praca trwa dalej, aby świat się dowiedział, że „Polacy, nie gęsi, że swój język mają“, swą literaturę bogatą, swą naukę, swe obyczaje.

I cóż mogli zrobić więcej polscy esperantysty?

Ale praca pójdzie dalej, bo dużo można jeszcze powiedzieć światu o kraju naszym, bo polscy esperantysty wiedzą, że dla dwóch wielkich pracują spraw.

Mieczysław Trochimowski.

VI ne volas aboni „POLA ESPERANTISTO“n?

NI tamen ne kredas!

El letero al Eska.

Kiel la ondoj trafluas maron
Per kanto brua,
Kiel la vent' agordas branĉaron
Al flustr' disflua,
Tiel en koro mia dormanta
Admono via
Movis la kordojn de ripozanta
Liuto mia.

En la anim' vekigis kaŝitaj
Ekbruoj maraj,
En silenteco senvivigitaj
Fabloj branĉaraj,
Kaj ia spasma koron kunpremis —
Malĝojo ia
Kaj muzikilo eĥe ekĝemis
Per voĉ' senkria.

Ho, ĉar mi ankaŭ estis rapsodo
De kanto juna,
Ne pro fiero kaj vanta modo
Aŭ kron' glorsuna —
Mi kun ĝi migris tra la disvojoj
De viv' dornplena
Por kanti gloron de novaj vojoj —
Ideo bona.

Sed ĉar liuto la nevidatajn
Fendojn posedis,
Ĉar kordojn havis ĝi delikatajn,
Korvoĉon kredis,
Do ĝi nur ĉiam veis kaj ploris,
Pri perdo ia,
Pri flamaj sentoj, kiuj pereis,
Pri amo mia...

Do ĝi nur kantis pri la amado
Kaj pri sufero,
Pri la eterna kor' sopirado
Kaj pri espero,
Pri humiliĝoj de perfidita
Koro malgaja,
Pri rememoro de la perdita
Printempo maja.

Sed kiam foje mi ĝin agordis
Al kant' titana,
Al la doloro, kiu min mordis
En kor' malsana,
Al la spirita barakt' diforta,
Kiun mi revis...
Sur la liuto kun zumo morta
La kordoj krevis.

Ĉu aĉa estis la muzikilo,
Ĉu man'tro juna?
Ĉu ĝin mortigis de maltrankvilo
Senfort' aŭtuna?
Ĉu kordoj estis ankoraŭ maldikaj
Por kant' freneza?..
Ĉu ĝin malhardis kantoj lirikaj
Pri l'am' multpreza?..

Tiam mi kaptis el Brust' senspira
Koron poetan
Kaj ĝin entombis sen plor' nevira
En liton pretan,
Mi ĝin luligis en la liuta
Intern' malplena,
Ke ĝi ripozu kun revo muta,
Pri senrevena.

Al trafluantaj ondoj la maron
Per kanto brua,
Al agordanta vento branĉaron
Per flustr' disflua

En sia ĉerko frapas la koro
Tiel silenta...
Kial vi vekis ĝin? Por doloro
De viv' momenta?

Ĉu do alingi molnovajn kordojn
Al muzikilo,
Denove verŝi plorajn akordojn
En nokt', trankvilo
Kaj arlekene sur malpleniĝo
De tomb' — pereco —
Fanfarojn bleki pri reviviĝo
De la pigmeo?..

Stanisław Braun



Opinie o Esperancie.

Ludwik Lu mière, członek Instytutu francuskiego pisze w następujący sposób:

Jestem przekonany, że rozpowszechnienie języka Esperanto mogłoby przynieść bardzo szczęśliwe wyniki w stosunkach międzynarodowych i w sprawie osiągnięcia powszechnego pokoju. Ale trzeba by zaprowadzić przymus nauczania tego języka w programach szkolnych. Wyśitek nauczania się go byłby niewielki, a młodzież byłaby łatwiej przygotowaną do międzynarodowej wymiany myśli i co za tem idzie — do prowadzenia różnego rodzaju interesów.

Jedynie przymus szkolny mógłby tu osiągnąć daleko idące korzyści.

Dlaczego podobna inicjatywa nie wyjdzie z grona Ligi Narodów?

Koniieczność wprowadzenia języka Esperanto do szkół uzasadnia p. Soiningen, dawny mi-

nister Wychowania Publicznego w Finlandji. Wychodzi on z tego założenia, że nauka języków zajmuje bardzo dużo czasu w szkołach średnich. W Finlandji naprzykład każdy przeciętnie wykształcony człowiek musi się uczyć trzech lub czterech obcych języków. Rezultat zaś jest taki, że z powodu trudności, jaką sprawia nauka tych języków, żadnego nie można się dobrze nauczyć i wyjątkowo tylko można się rozmówić cudzoziemcem.

Esperanto, jako język łatwy ma już swoje miejsce w handlu, na kongresach, w korespondencji i turystyce — gdyby był rozpowszechnionym we wszystkich gałęziach nauki, oszczędziłby ludziom bardzo wiele drogiego czasu. Wprowadzenie Esperanta do szkół otworzyłoby nową erę w wychowaniu publicznem. Wszyscy wychowawcy i nauczyciele powinni się tem poważnie zainteresować.

Metodo de propagando

en la scienca kaj teknikaj gazetaro.

La Internacia Scienca Konferenco de Parizo (Majo 1925) rekomendis klopodi por ke la sciencaj kaj teknikaj Revuoj de ĉiuj landoj publikigu esperantajn resumojn de la artikoloj redaktitaj en naciaj lingvoj. Je la monato de Oktobro 1925, la Internacia Kongreso de la Teknika Gazetaro, sidanta ĉe Parizo, esprimis la saman deziron.

Ĉar estas ofte malfacile sukcesi, kiam oni nun petas tion de la Revuoj, jen alia pli simpla metodo, kiu estos eble pli afable akceptata.

Tiuj resumoj estos utilaj al la alilandaj legantoj de la Revuoj, sed ankaŭ, kaj ĉefe, al la alilandaj samfakaj Revuoj, kiuj per ili povos publikigi resumojn de la plej interesaj artikoloj, kaj konigi al siaj legantoj la verkojn de iliaj alilandaj kolegoj.

Por atingi tiun celon, sufiĉus ke la resumoj de ĉiu numero estu publikigitaj daktilografe sur aparta folio, kaj sendataj al ĉiuj samfakaj Revuoj alilandaj.

Ĉar sufiĉos du paĝoj, kaj ĉar la nombro de la samfakaj Revuoj ne estas granda (eble maksimume cent), la elspezo povas esti facile pagata de ĉiu Revuo, eĉ ne grava.

Direktoro de Revuo, kiu estos ricevinta kelkajn tiajn resumojn de diverslingvaj samfakaj kolegoj, komprenos utilcon de tiu metodo — kaj de

Esperanto — li aplikos mem la metodon, kaj verŝajne farigos propagandisto de nia lingvo.

Sekve la esperantistaj Societoj de Specialistoj, la Naciaj Societoj de propagando, la naciaj Grupoj, eĉ ĉiuj samideanoj, devus agadi tiumaniere koncerne la teknikajn Revuojn, al kiuj ili povas sin turni; ili havos kelkajn ŝancojn de sukceso. Komence, ili proponas traduki mem la resumojn; aliparte S-ro Kamaryt iniciatis jam tiun proponon, kreante sciencan sekcion en la Ĉeĥoslovaka Societo por fari tiajn tradukojn. Tio estus interesa kaj instrua laboro por la lokaj Grupoj, kies kunsidoj estas ofte nemulte interesplenaj.

Oni, se eble, komencu tiun agadon en la radiotelefona gazetaro, kie nun nia propagando prosperas; sed ĝi estu ankaŭ provita en la aliaj teknikoj.

Pri la teknikaj terminoj, jam multaj troviĝas en la naciaj vortaroj de la kutima lingvo, aŭ en la Enciklopedia Vortareto de Verax; aliparte, laŭokaze oni uzos la terminon uzitan en iu el la ĉefaj naciaj lingvoj, substrekante ĝin kaj aldonante inter krampoj la naciecon de la lingvo.

Rollet de l'Isle.

Komuniko Nr. 1

de la Organiza Komitato de l'VII Kongreso de P. E. A.

(Wilno, 22-24 majo 1926 j.)

Laŭ la deziro de la VI Kongreso de P. E. A. en Warszawa en 1925 j., Pola Esperanto-Asocio en Wilno decidis aranĝi la VII-an Kongreson en Wilno kaj tiucele estis starigita loka Organiza Komitato:

Prezidanto — S-ro Prof. Jan Muszyński,

Ĝenerala Sekretario — S-ro Prokuroro Roman Sakowicz,

Kasisto — S-ro Waclaw Jankowski.

La Organiza Komitato decidis aranĝi la VII-an Kongreson de P. E.-A. dum Pentekosto de 1926 j.—22, 23, 24 de majo.

La Kongreso estas aranĝota en la muroj de la bela Universitato de Stefan Batory.

Estos organizita komuna tagmanĝo de kongresanoj, vaporŝipa vojaĝo al bele lokita ĉirkaŭaĵo ktp.

Programo de laboroj de l'Kongreso estos starigita plimalfrue, sed la Organiza Komitato petas ĉiujn grupojn de P. E.-A. kaj izolajn membrojn sendi al la Komitato siajn proponojn kaj dezirojn sub la adreso:

WILNO, Krzywa 23, S-ro Roman Sakowicz, VII Kongreso de P. E.-A.

Kongresa karto — 5 zł., por subtenantoj (ili estu multenombraj) — 10 zł., por studentoj kaj lernantoj — 3 zł.

Monon bonvolu sendi al P. E.-A. en Wilno, ul. Mickiewicza 37, S-ro Józef Bacewicz.

Alilandaj samideanoj estos varmege atendataj.

Roman Sakowicz
Ĝenerala Sekretario.

Wilno, Januaro 1926 j.

Od 17 b. m. P. T. E. przyjmuje zapisy
na nowy kurs dla początkujących.

Pri la Regularo de la K. R.

Alvoko al la Esperantistaro.

Responde al la cirkulero de la prezidanto de K. R., enhavanta la projekton de la regularo de K. R., la Franca Societo por la Propagando de Esperanto kaj la Pola Esperanto Asocio, ĉiu aparte, trovintaj en la citita projekto mankojn amendindajn, komunikis al la prezidanto de K. R., siajn proprajn projektojn de la regularo, konforme al la frazo de la cirkulero: „Bonvole sciigu al ni kiel eble plej baldaŭ ĉu vi aprobas la projekton, aŭ kion vi volas aldoni aŭ aliigi“. La Franca Societo por la Propagando de Esperanto dissendis krome sian projekton al deko da alilandaj societoj naciaj por antaŭa priksidero. Ĉe la kunsido de K. R. en Genève, la 2-an de aŭgusto, fakte prezidinta la kunsidon, S-ro Edmond Privat

deklaris, ke la oficiala projekto de la regularo de K. R., jam estas akceptita, ĉar la plimulto de la naciaj societoj ĝin konsentis, kaj li ne allasis la diskutadon pri la franca kaj pola projektoj. La reprezentanto de Pola Esperanto Asocio tuj protestis kontraŭ tiu nelojala farmaniero. Efektive, ne decas peti pri „aldonoj aŭ aliigoj“ kaj poste ne deziri eĉ aŭdi kaj aŭdigi la sugestiojn, faritajn laŭ tiu peto. Ambaŭ tiel ofenditaj Esperantistaj Organizoj nur pro samideana sento de konkordo ne eksigis tuj ĝi la Konstanta Reprezentantaro, firme kredante, ke la vasta esperantista mondo volos kaj scios kun sufiĉa forto respektigi al niaj centraj institucioj la principojn de justecon kaj komuna takto.

La rolo de U. E. A.

Ne ĉiuj esperantistoj konscias la ĝustan signifon de U. E. A. en la esperantista movado. Laŭ opinio de kelkaj, U. E. A. estas senviva organizaĵo, sen koloro kaj vivo. Ili pli-vole aliĝas al ia ajn aro de abonantoj de „Verda Movado“ aŭ alia organo, aperanta unufoje en du monatoj...

La ĝusta signifo de U. E. A. konsistas ne en ĝia eldonaĵo „Esperanto“, cetere bonege redaktata kaj tre interesa revuo, enhavanta krome t e bonlingve

redaktatan literaturan parton, sed en tio, ke U. E. A. mem estante en sia esenco la plej viva pruvo pri la forteco de nia movado, la plej bona propagandilo, plenumas en la esperantista movado kaj multe ekster ĝi mem, la saman rolon, kiun plenumas ekz. en la nonsistema organizaĵo. la tutŝata Ĉekbanko (en Polujo poŝtŝparkaso), en la telefonio la telefona Centrejo, eldonantaj ĉiujare kompletajn adresarojn de siaj anoj. same kiel U. E. A. eldonas la Jarlibron de la Esp. Movado.

La fakto de arbitra malpermeso de la diskutado pri la ambaŭ projektoj estas des pli bedaŭrinda, ke ili enhavis tre gravajn punktojn, kiuj povus multe utili al la plua efika agado de la K. R.

La franca projekto celis, nome, pligrandigi la memstarcon kaj la signifon de K. R., kaj kontraŭstaris ĝian limigon al la sola rolo de monliveranto, kio ŝajne estis la gvida principo de la oficiala projekto.

La franca projekto akcentigis, interalie, ke la prezidanto de K. R. devas esti ano de tiu institucio; ke la K. R. estu kunvokata almenaŭ dufoje en la jaro; ke la reprezentantoj, ne povantaj alveni al la kunsido de K. R., rajtu sin anstataŭigi de alia persono aŭ voĉdoni skribe; ke por la elekto de la estraro de K. R. kaj de la anoj de C. K. necesa estas voĉdono skriba kaj sekreta, garantianta la liberecon de opinio; ke la monsumoj enkasigataj devas

servi egale al la bezonoj de C. K., kaj de K. R., k. m. a.

La projekto de la Pola Asocio, krom multaj plibonigoj teknikaj, enhavis la punkton pri financa kontrolo de la kaso de C. K. kaj de K. R., kiu en la oficiala projekto strange limiĝas al simpla „aŭdo de raporto de C. K.“. Prezertante la polan projekton al la prezidanto de K. R., la reprezentanto de la Pola Asocio skribis en sia letero pri tiu punkto: „La oficiala projekto certe nur pro forgeso, ne antaŭvidas la financan kontrolon de la kaso de C. K., kaj de K. R. Nia paragrafo proponas la manieron aranĝi tiun kontrolon“. Post tiu rimarkigo ŝajnis nedubeble, ke la oficialaj projektantoj enkondukos ankaŭ en sian propran projekton la necesan punkton pri kontrola komisiono, kiu ekzistas en ĉiuj publikaj asocioj kaj kiu ankaŭ por la kontrolatoj prezentas gravan privilegion moralan. Nenio si-

Kiam ĉiuj esperantistoj tion ekkomprenos, U. E. A. fariĝos ankoraŭ pli altgrade tio, kio ĝi devas esti: nia Ligilo. sen kiu la praktika uzado de Esperanto estas fakte preskaŭ nebla en la nuna tempo.

Tion ni atingos nur, kiam simile al la telefona Organizo, ni estos kuniĝintaj tre multmilaj en U. E. A., per nia nombrego ebligantaj, ke la servoj de U. E. A. estu, kiel eble plej malmultekostaj: anstataŭ 15 zl. ni povas tiam pagi nur ekz. 5 zl. jare.

Ĉu U. E. A. ĉiam ekzistos?

Verŝajne jes, ĉar verŝajne neniam ĉiuj senescepte homoj sur la tera globo estos esperantistoj. Estas eble, ke mi eraras. Povas esti, ke en la estonteco efektive ĉiuj homoj komprenos Esperanton. Tiam U. E. A. ne plu estus bezona.

En la nuna tempo ni estas ankoraŭ tre malproksimaj de tia stato. Ni bezonas U. E. A. kaj ne povas ne aliĝi al ĝi. Estas ĝojinde, ke hodiaŭ la nombro de la U. E. A. ŝuperis tiun de 1914-a jaro.

Leo Turno.

mila okazis. Oni ne nur ne ŝanĝis la oficialan projekton, sed eĉ ne permesis diskuti la polan.

En tiaj cirkonstancoj, la Societo franca por la propagando de Esperanto kaj la Pola Esperanto Asocio sentas sin devigataj prezenti al ĉiuj naciaj societoj senpere kaj al la publika opinio esperantista sian nun komunan projekton pri la Regularo de la Konstanta Re prezentantaro de Naciaj Societoj Esperantistaj. Tiu projekto devas, nature, iri pli malproksimen sur la vojo de demokratigo kaj ordigo financa de nia Re prezentantaro, ol la ŝanĝoj, proponitaj de la pola kaj franca asocioj al la kunsido de K. R. en Genève. Ni devas esti certaj same pri lojala, senpartia kaj bontakta traktado de ĉiuj naciaj Societoj, kiel pri bona

uzo de la mono, kiun ni donas al la esperanta propagando. Ni esperas, ke ĉiuj naciaj societoj, ĉiuj esperantistoj subtenos nin en tiuj justaj postuloj. Ni petas la Naciajn Societojn alsendi al la Societo franca, 15, Avenue d'Orléans, Paris, aŭ al la Pola Esperanto Asocio, Królewska 19, Warszawa, siajn aliĝojn al la projekto kun opinioj kaj rimarkoj. La projekto estos sendata al la estraro de K. R. por submeto al la voĉdono dum la Edinburga Kongreso.

Samideanoj! Defendu viajn rajtojn kun la niaj!

Societo franca por la propagando de Esperanto.

Pola Esperanto — Asocio.

Projekto de regularo

de la Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj.

Relo de la K. R.

Art. 1. — La K. R. de la naciaj societoj esperantistaj zorgas pri la reciprokaj informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj institucioj de la Esperantistaro.

Ĝi interkonsentas kun la komitato de U. E. A. pri la elekto de la Centra Esperanto-Komitato.

Ĝi povas komisi la C. R. por la plenumo de iu ajn el siaj decidoj.

Konsisto.

Art. 2 — K. R. konsistas el

unu reprezentanto de ĉiu nacia societo. Tiu reprezentanto rajtas havi apud si, dum la kunvenoj de K. R., ne pli ol du asistantojn, kiuj rajtas paroli en la debatoj, sed ne voĉdoni krom li.

Ĉiu nacia societo devas sciigi al la estraro de la K. R. la nomon kaj la adreson de sia reprezentanto, al kiu estas sendataj ĉiuj korespondaĵoj pri la K. R.

Estraro

Art. 3. — La estraro de K. R., konsistas el prezidanto kaj

sekretario-kasisto. Ambaŭ estas elektataj por tri jaroj. La prezidanto de C. K. plenumas sian oficon tute honore kaj ne ricevas de la kaso de la esperantistaro ian salajron aŭ subvencion. La sekretario-kasisto povas esti prenata ekstere de la reprezentantaro.

Se la prezidanto forestas de iu kunsido de la K. R., la kunsidantoj elektas prezidanton, kiu oficas nur dum tiu kunsido.

Art. 4. — La estraro preparas la laboron de la kunsidoj de K. R., la statistikojn kaj la dokumentojn necesajn por la diversnacia propagando. Ĉiu nacia societo devas sendi al ĝi resumon en Esperanto de sia jara agado, laŭvole kun bilanco, montrante la nombron da membroj kaj la ĉefajn rezultatojn.

Art. 5. — La prezidanto devas kunvoki la membrojn de K. R. almenaŭ dufoje ĉiujare, kaj ĉiufoje, kiam tiu kunvoko estas postulita de almenaŭ dek naciaj societoj. La tagordo devas esti sendata al la naciaj societoj unu monaton antaŭ la kunsido. Ĉiuj proponoj de la estraro de K. R. kaj de la C. K. al la naciaj societoj devas esti sendataj al ĉiuj naciaj societoj almenaŭ du monatojn antaŭ ilia diskutigo ĉe la kunsido de K. R. Same la estraro de K. R. kaj la C. K. devas esti sciigataj pri ĉiu propono de ia nacia societo du monatojn antaŭ la kunsido de K. R., ĉe kiu la propono estos diskutata.

Neniu propono povas esti voĉdonata sen antaŭa publika pridiskuto en kunsido de K. R.

Voĉdonado

Art. 6. — Ĉe la kunsidoj de K. R. ĉiu societo havas nombron da voĉoj proporcia je la nombro da anoj, por kiu ĝi pagas kotizon.

La reprezentantoj de naciaj societoj, kiuj ne povas ĉeesti iun kunsidon de la K. R. povas voĉdoni per letero aŭ sin anstataŭigi.

La voĉdonoj pri la elekto de membroj de C. K., devas esti skribaj kaj sekretaj.

Kotizaĵoj

Art. 7. — La kotizaĵo de la naciaj societoj estas fiksata de la K. R. mem ĉiujare kaj kalkulata laŭ la nombro de la anoj, konstatita en ĉiu societo ĉe la fino de la antaŭa jaro.

La societoj, kiuj ne pagis sian kotizaĵon, antaŭ la 1-a de Julio ne rajtas plu voĉdoni ĝis pago.

Art. 8. — La kotizaĵojn, kiujn ĝi enspezas de la naciaj societoj, la K. R. uzas unue, por siaj propraj bezonoj, kaj due, por la bezonoj de C. K., kiu devas ĉiujare raporti antaŭ ĝi pri sia jara agado kaj sia financa situacio. Tiu raporto estas sekvata de la raporto de la kontrola komisiono.

Kontrolo de la kaso

Art. 9. — Ĉiujare, dum Universala Kongreso, K. R. elektas inter siaj anoj, ne apartenantaj al la C. K. aŭ al la estraro de K. R., tri kontrolantojn por kontroli la kasojn kaj la kalkulojn de C. K. kaj de K. R. La kontrolantoj prezentas

al la kunsido de K. R. sian raporton, tuj post la raportoj de C. K. kaj de la estraro de K. R.

Konfirmo de la decidoj

Art. 10. — La decidoj de K. R. estas submetataj de la estraro al la naciaj societoj por skriba konfirmo.

Se iu societo ne respondis post du monatoj, aŭ tri monatoj, se ĝi estas ekstereŭropa, ĝi estas konsiderata kiel konfirmanta.

Komuna agado kun U. E. A.

Art. 11. — Kiam K. R. pri aferoj de komuna intereso kunidas kun la komitato de U. E. A. kaj la C. K., la kunsido okazas sub la prezido de la prezidanto de C. K.

Ŝanĝoj de la Regularo

Art. 12. — K. R. ŝanĝas sian regularon post proponoj de la naciaj societoj. Tiu regularo ne povas enhavi ion, kio ne akordiĝas kun la kontrakto de Helsinki, modifebla nur per interkonsento inter K. R. kaj U. E. A.

Tra la mondo esperantista

Grava anonco

Lastan vintron la esperantistoj de la ĝemelurboj Minneapolis kaj St. Paul, Minnesota, Usono, dissendis sian unuan programon en Esperanto pere de la potenca radio stacio WCCO. La rezultato estis tiel bonega, ke la estraro de WCCO volonte konsentis, ke ni dissendu alian programon. Ĝi okazos la 12-an de Februaro, je la datreveno de la mond-fama Usona eksprezidanto Abraham Lincoln, kaj estos do Lincoln'a programo. La programo komencos je la 5-na horo nokte. Oni elektis malfruan horon por ke la aero estu pli libera kaj, por ke oni estu pli certe aŭdata ne nur en tuta Usono, sed ankaŭ en Eŭropo.

WCCO, Ora Medalo Stacio, estas propraĵo de Washburn Crosby Kompanio, muelistoj de la fama Gold Medal Flour

(Ora Medalo Faruno). La funkciadon de la stacio kontrolas 500 subskribantoj de Minneapolis kaj St. Paul. WCCO, kun potenco da 5,000 uatoj, estas unu el la 14 plej potencaj stacioj en Usono. La ondlongeco estas 416.4 metroj.

Oni urĝe petas ĉiun leganton, ke li nepre skribu al WCCO, Gold Medal Station, Minneapolis, Minnesota, U. S. A., pri lia sukceso aŭ malsukceso en la aŭdado de la programo. La esperantista movado tie estas nova, sed tre vigla. Vi montru la vivecon de la movado ĉe vi per nepra letero aŭ karto.

Nova esperantista entrepreno

Ĝus fondiĝis en Londono akcia kompanio, sub la titolo, „The Esperanto Institute Limited“, por akceli la progreson de Esperanto pere de ĝia praktika aplikado kaj uado. La Direk.

toroj estas s-roj H. Boll, Charles, H. Edmonds, F. L. Jones, F. R. Shelton, G. T. Smith kaj F. E. Wadham, kies nomoj estas bone konataj de multe da samidanoj tra la mondo. La Kompanio estas lege registrita kun oficejo ĉe Welwyn Garden City, apud Londono.

Jam fukciantaj fakoj estas reklamagentejo, vojaĝagentejo, kaj libro-eldonejo. La Kompanio estas oficiale difinita kiel Tutmonda Disvendagentejo por la Esperantaj Gramafondiskoj „Linguaphone“.

Siatempe ĝi difinos agentojn en ĉiu lando por peri rilatojn. La adreso por leteroj estas: The Esperanto Institute Limited, Welwyn Garden City, Herts, Anglujo.

Pasko en Rouen

La nove-fondita akcia kompanio en Londono, The Esperanto Institute Limited, aranĝos Esperantistan Karavanon por britoj al Rouen, kiu alvenos en tiun urbon vendredon 2-an de Aprilo tagmeze kaj forlasos ĝin lundon 5-an de Aprilo vespere. Dum ĝia restado en Rouen la karavano loĝos en bela, komforta pensiono kaj partoprenos aŭtomobilajn ekskursojn al la malnova normanda urbeto Caudebec, ankaŭ al la urbetoj Les Andeleys kaj Junieges. Esperantistoj el aliaj landoj povos gastigi en la sama aŭ apuda pensiono je modera prezo. Sin turni al The Esperanto Institute Limited, Welwyn Garden City, Herts, Anglujo.

Agu, Esperantistoj!

Ni speciale atentigas nian legantaron pri la malsupre presigita alvoko. Ni esperas, ke la esperanistaro komprenos ĝian gravecon.

La Red.

La „Internacia Konferenco por uzado de Esperanto en la puraj kaj aplikitaj Sciencoj“ (Paris, 14.—16. Majo 1925) unuanime akceptis jenan rezolucion:

Responde al la danke akceptata propono de la Germana Ligo de teknika-sciencaj unuiĝoj, transdonita de ĝia delegito s-ro Behrendt, la konferenco decidas peti la kompetentajn organizaĵojn de la Esperantomovado, ke ili kolektu adresojn de teknikistoj kaj scienculoj in-

teresataj pri tekniko, por aperigi teknikan internacian gazeton en Esperanto.

La citita Germana Ligo estis reprezentata ankaŭ en la XVlla Universala Kongreso de Esperanto (Genève, 2 — 7. Aŭgusto 1925) per sia ĉefsekretario Dro Freitag, kiu proponis al la Kongreso samsencan rezolucion. La Kongreso unuanime akceptis ĝin.

Sekve: Germana Ligo de teknika-sciencaj unuiĝoj (Deutscher Verband technisch-wissenschaftlicher Vereine) estas preta, aperigi teknikan gazeton en E., se ĝi enhavos sufiĉe ampleksan adresaron de teknikistoj, inĝenieroj kaj teknike interesataj personoj ĝenarale, ĉu sci-

enculoj, ĉu industriistoj, kiuj kapablas legi Esperanton. Por starigi tian adresaron, helpu la rezolucio. La eventuale eldonata gazeto estos sendata senpage al ĉiu konata adreso de la pridirita speco. La afero estas grava. De la Esperantistaro dependos, ĉu la propono de la germana Ligo povos esti realigata. Mi opinias, ke ne estas necese, speciale akcenti la situacion. Ĉiu serioza, praktika Esperantisto komprenos, pri kio temas. Se la adres-kolektado ne donos sufiĉan rezulton, grava momento ne estos ekspluatita. Kaj poste — simile favora situacio por praktika uzo de Esperanto en tekniko verŝajne ne revenos! — Pri informoj dezirataj oni skribu al: telegraf-direktoro Behrendt, Berlin W 30, Hohenstaufenstr. 24, aŭ al: Deutscher Verband technisch-wissenschaftlicher Vereine, Berlin NW 7, Sommerstr. 4a; tien oni ankaŭ sendu la adresojn.

De vi mem, estimata samideanaro, dependas grava progreso en la Esperanto-movado! /Agu laŭ via bontrovo! Kaj agu rapide!

Behrendt.

Bibliografio

Esperanto - Germana Biblioteko. Eldonata de D-ro Emil Pfeffer, Vieno. Elektita Esperanta legaĵo. Libreto 31 paĝa, formato 12×17, kun tekstoj germana kaj esperanta interliniita. Ĝi enhavas efektive bone elektitajn tekstojn, taŭgaj precipe por germanlingvaj legantoj, ĉar presita en du lingvoj. Prezo 50 cen-

timoj svisaj.: Esperanto - Ver eine, Wien, VII., Lerchenfelderstr. 23.

Kataluna Antologio, kompilita de Jaume Grau Casas. Lukse eldonita libro, 414 paĝa, formato 15×22. Prezo: 15 pesetojn, ĉe S-ro Eduard Capdevila, C. Carders, 29, Barce'ona. Jen vere belega, utila kaj inda dokumento. Jen homoj, kiuj komprenis la celon kaj utiligon de Esperanto. Kritikon mi devus fari pri tiu libro: Vortoj mankas por esprimi mian admiron pri ĝi. Kion ne povus fari popolo, kiu scias esprimi kaj montri sian volon? Per kio plej bone oni provos sian vivon ol per monro de tiu vivo mem? Ĉu la lingvo kaj literaturo de popolo ne estas la esenco mem de ĝia vivo? Per tiu Antologio, la Katalunaj samideanoj pravas ne nur la vivkapablon de Esperanto kaj la viglecon de ilia organizo kiel Esperantistoj, sed ili pruvis la vivpovon, kulturon de sia lingvo kaj literaturo. La Kataluna lingvo estas unu el la plej malnovaj el ĉiuj latinidaj, kaj unu el la plej flekseblaj kaj esprimplenaj. En tiu bonega libro, ni trovas ĝian historion, kun instruigaj komparoj, kaj ni retrovas la fortan popolon ĝin parolantan.

Jam la Trubaduroj pruvis ĝian poeziemon kaj ĝian forton ne nur en siaj kantoj pri amo, sed ankaŭ en siaj „Sirventes“, (satiroj, kiujn ili sciis uzi por liberigi sin el siaj malamikoj, ekscitante ilin unu kontraŭ la aliajn.) Dum ili batalis inter si la Pireneoj ĝuis la pacon kaj trankvilon. Ni sekvas la disvolv-

ĝon de tiu literaturo, de la mezepoko ĝis niaj tagoj! Kia ĝuo legi tiun mezepokan literaturon, konstati ĝian facilecon kaj profundecon samtempe! Jen mirindaj kantoj pruvantaj la delikatan observo-kapablon, jen admiresprimo al la ĉion reganta Amo. Ramon Lull (1235-1316) kantas: „Amo estas storma maro de ondegoj kaj ventegoj, kiu ne havas havenon nek bordon“ kaj plie: „D. ru, birdo kantata, ĉu vi metis vin en servo de mia Amato, por ke li vin gardu de neamo kaj multobligu en vi la amon?“ — Respondas la birdo: „Kaj kiu do kantigas min se ne estas la Sinjoro de Amo por kiu neamo estas ne-honoro“. Poste ni trovas Jacint Verdagauer, aŭtoro de mirinde bela kaj profunda scienca poemo laŭ la legendo pri sub-

akviĝo de Atlantido. En multnombraj poemoj kaj verkoj aliaj ni trovas la saman delikatan obsevo-kapablon, de admiro arda al ĉiuj elementoj ĉirkaŭantaj aŭ impresintaj la aŭtorojn. Inter multaj tiaj de mi konataj nur nome aŭ tute ne, vel ni retrovas aliajn de longe tradukitajn en Esperanto: Adria Gual, Santiago Rossinyol, kaj eĉ nian Samideanon Frederic Pujula kun sia „Ĉevalo“, tradukita en Esperanto de li mem. Bonega kaj sentoplana satiro, pri krueleco de la Toraj luktoj. Unuvorte, veran, daŭran plezuron havigos al si la aĉetanto kaj leganto de tiu bonega libro. Ĝi havu la merititan sukceson en la Esperanta mondo!

E. F. C.

Ze ŝwiata esperanckiego.

Esperanto na uslugach poczty i telegrafu.

W sierpniu r. z. Międzynarodowa Konferencja Unji Telegraficznej uchwaliła uzupełnić 7-my artykuł Międzynarodowego Regulaminu Telegraficznego słowami: „Użycie Esperanta w telegrafji jest dopuszczalne“. W myśl tego postanowienia szereg państw zgodziło się na wprowadzenie Esperanta do telegrafji, np. Francja. W ostatnich czasach donoszą nam, że Izba dla Handlu i Przemysłu w Budapeszcie zwróciła się do Ministerstwa Handlu z propozycją zastosowania się do uchwały Konferencji. Ministerstwo

ze swej strony nie stawia żadnych przeszkód. Należy się spodziewać, że niezadługo nasze ministerstwo pójdzie za przykładem innych państw.

Z kongresu japońskich lekarzy.

Dn. 12 października r. z. odbył się w Tokio zjazd lekarzy, w którym wzięło udział 400 japońskich doktorów medycyny i 120 z krajów sąsiednich. Dr. T. Ogata, profesor Cesarskiego Uniwersytetu w Tokio, omawiał po esperancku kwestję witamin. Po nim zabrał głos Dr. M. Murata, który, również po esperancku, przemawiał o potrzebie języka międzynarodowego podczas kon-

gresów i gorąco polecał obecnym naukę Esperanta.

Prośba, zwrócona do parlamentu i opatrzona 10,000 podpisami, by zbadał sprawę esperancką i wprowadził Esperanto do szkół niższych i średnich, została przyjęta przez obydwie izby parlamentu. Gorąco popiera Esperanto także Cesarska Akademia. Szereg lekarzy japońskich chce wnieść odpowiedni wniosek w sprawie Esperanta na przyszłej konferencji chorób tropikalnych.

Egzaminy esperanckie w Austrii.

Na mocy reskryptu Min. Oświaty z dn. 30 kwietnia r. z. w dniu 3 listopada odbył się tu pierwszy esperancki egzamin państwowy. Do egzaminu przystąpiło 30 osób. Wobec doskonałego wyniku specjalna delegacja utworzyć ma kursy dla kolejarzy, dla których język międzynarodowy jest konieczny.

Esperanto a radio.

Decyzja Międzynarodowego Kongresu radio-amatorów, który odbył się w Paryżu r. z., uznająca Esperanto za swój oficjalny język i za język obrad przyszłych kongresów, ogromnie poruszyła sfery radio-amatorskie. W Europie 80 stacji nadaje od czasu do czasu programy esperanckie.

W Berlinie Juljus Glück, dyrektor stacji radiofonicznej, napisał podręcznik esperancki dla słuchaczy radia. 4000 egzemplarzy rozeszło się w ciągu 2 tygodni. Poza tem dyr. Glück zaprosił swych słuchaczy do wzięcia udziału w konwersa-

cyjnym kursie przez radio. Do tej pory zapisało się przeszło 500 osób.

Ze śląskiego związku kolejarzy.

Przedstawiciele śląskiego związku kolejarzy, liczącego 900 członków, przyjęli uchwałę, podpisaną przez prezesa Scierskiego i sekretarza Furgola, polecającą wszystkim członkom naukę Esperanta. Jednocześnie wysłano do Rządu Rzeczypospolitej prośbę o wprowadzenie tego języka do szkół polskich. Podobną uchwałę przyjął równocześnie związek urzędników celnych, telegrafistów i telefonistów Górnego Śląska.

Esperanto w Czechosłowackich Szkołach.

Bodajże najlepiej rozwija się Esperanto w Czechosłowacji. W szeregu miastach wprowadzono ten język do szkół. Ostatnio rada jednego z miast uchwaliła wprowadzić Esperanto do szkoły dla dziewcząt, narazie jako przedmiot nieobowiązkowy. Zapisało się przeszło 100 dziewcząt.

Z Ameryki.

Związek handlowców publikuje w swym biuletynie uchwałę, powziętą na Międzynarodowej Konferencji dla handlu i przemysłu o przyjęciu Esperanta w stosunkach handlowych. Wymieniony związek, liczący przeszło 24,000 członków, zaakceptował tę rezolucję.



Ricevitaj gazetoj:

Amerika Esperantisto (Januaro), Oomoto Nr. 18 (Japano)
Oomoto Nr. 2 (parizo), Konkordo Nr. 1, Germana Esperantisto
Nr. 1, 2, Espero Katolika Nr. 16, Revista del Ateneo Nr. 18,
Heroldo de Esperanto Nr. 101, 102, 103, 104, International
Language Nr. 1, La suno hispana Nr. 104, Hinda Esperantisto
Nr. 2, Libero Nr. 8.

Nowe uzupełnione wydanie

Kompletnego podręcznika języka Esperanto

Leo Turno, członka Komitetu językowego,
ukazało się już nakładem autora i jest do nabycia w cenie
Zł. 1.25 za egz. Wysyła się najmniej 5 egz. Przy zamówieniu
10 — 25 egz. udziela się 25% rabatu, 25 — 30 egz.
30% rabatu. 50 — 100 egz. 38 ¹/₃% rabatu. Wysyłkę
uskutecznia się po utrzymaniu należności na P. K. O.
Kraków, nr. 405.716 lub na adres:

LEOPOLD DREHER, Kraków, Starowiślna 37.

„Verda Meteoro“

**gazeto eldonata en unu ekzemplero, rondiranta
de unu al alia abonanto**


Abono: 20 gr. por unu numero.

**Abonu ĉe ANTONI JAWORSKI, Ostrów, Mazowiecki
Stacja kolejowa.**

Kiu varbos 5 novajn abonantojn

ricevados nian organon

senpage dum la tuta jaro.



En la jaro 1926 ĉiu grupo aŭ agentejo ricevas

20% da rabato


propagandante nian organon

„Pola Esperantisto“

La administracio akceptas reprezentantojn en ĉiuj lokoj de la mondo, disvastigantajn

„Pola Esperantisto“n

Varbu novajn abonantojn!



Memoru pri la adreso:

Warszawa, Widok 19.

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.

Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Pawia 10.